

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 46, Decembro 2021



Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Kerstin kaj Pär-Johan vizitas la Esperanto- bibliotekon en Stannum .....	17
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Julo-vojaĝo al Prago 2013 .....	18
Espeporko meditas.....	3	La malnova preĝejo de Örgryte, Gotenburgo.....	22
Vintraĵ hajkoj.....	3	Dalarna.....	24
Gotenburgo estas lumigita.....	4	Aŭtuna mateno.....	26
Salutojn el Gdanko! .....	5	Ps.139:9–12.....	26
Vintra saluto el Aŭstrio .....	6	Eltondita el Göteborgsposten numero 1, 1987 – Saxat ur Göteborgsposten nr. 1, 1987 .....	27
La kristnaska donaco de 2021 devus esti BRAKUMO, ĉu ne?.....	6	Göteborgskoloristerna, parto 4 de Ingegerd .....	29
Decembra fabelo.....	7	Galerio Inge Schiöler.....	31
Sentenco de la saĝa strigo.....	7	Tina.....	32
Kelkaj memorbildoj pri Britta Rehm.....	8	Inversa vetkurado.....	33
Ora Ĵurnalo, 4-jara, estis celebrita 13 novembro.....	9	Danan poemon sendis al ni Torben Svendsen.....	34
Ora Ĵurnalo ricevis novan "magazinan kunulon".....	10	Kiun lingvon ni uzu en kongresoj? .....	34
Rekorde intensa kultura monato en Svislando .....	11	La sveda lingvo ruiniĝas... ..	35
JES 2021/2022 okazos en Wittenberg .....	11	Saltkråkan .....	37
Temo: "gvidlingvo" de federacia Eŭropo .....	12	Vikinga ido venkas Eŭropon.....	42
Kiu oficiala lingvo por federacia Eŭropo? ....	12	"La granda JULLIBRO" rakontas i.a. pri julaj tradicioj en kelkaj eŭropaj landoj.....	43
Kerstin Rohdin kontribuis al la Esperanto- Sabato, la 27an de novembro en Gotenburgo. Ŝia filo Pär-Johan Goody-Rohdin akompanis ŝin. ....	13	Kvizo pri Gotenburgo .....	45
Raporto de "Down Under" 2004.....	14	Nova libro de Sten Johansson ĉe Mondial... ..	48
Perth, Västra Australien .....	17		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)  
kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32,  
[ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas  
Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).



**Lasta dato por kontribuoj al la januara numero: 1 januaro.**



## Espeporko meditas

- ☆ Per bildoj ni memoru nian multjaran membron Britta Rehm, kiu forpasis la 14an de novembro, 91-jara. Mi ankoraŭ povas imagi la sonon de ŝia gaja rido.
- ☆ Dum la aŭtuna sezono la Esperanta klubo en Gotenburgo havis du Esperanto-sabatojn kun prelegoj kaj ĉiun duan sabaton duhorajn kursojn. Komencas simili al antaŭ-pandemiaj tempoj.
- ☆ Mi ja ŝatas raportojn el multaj landoj. En ĉi tiu numero ni legas pri julaj tradicioj en diversaj eŭropaj landoj.
- ☆ El Danio venis pensiga poemo. En Albanio eldoniĝis fama sveda esperantolibro. Bondeziroj por la julo venis al ni el diversaj landoj.
- ☆ Translokiĝi de Svedio al Aŭstralio – kia aventuro! La unuaj spertoj restas en la memoro de Pär-Johan.
- ☆ Meze en la malvarma decembro, la rakonto pri someraj aventuroj en Saltkråkan, verkita de Astrid Lindgren kaj libere rakontita de Ingegerd, varmigas nin.
- ☆ Lastfoje ni skribis pri revuoj kaj magazinoj kun kiuj ni havis kontakton. Poste ni eksciis pri la esperanta magazino "Magdeburga gazeto" de Germanio.
- ☆ Oni diskutas, diskutadas la lingvoproblemojn en la mondo kaj mi miras ke esperanto estas tiom ignorata. Eble ni povus lerni ion de la metodoj de la energia Lingvodefendo? (Språkförsvaret)
- ☆ La pacan premion ricevis du ĵurnalistoj pri ĉies rajto sin libere esprimi.
- ☆ La redakcio deziras al vi Bonan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron!

Ĝis januaro! /Siv



## Vintraj hajkoj



En la vintra arbareto  
mi aŭdas feblajn eĥojn  
de antaŭ tre, tre longe

*Issa*

Sur la monto kaj la ebenaĵo  
ĉio estas senmova  
en ĉi tiu neĝa mateno

*Chiyo-ni*

# Gotenburgo estas lumigita



## Aparte la amuzparko Liseberg brilas



## En Liseberg vi povas sketi, aŭskultante julmuzikon



# Salutojn el Gdansko!

Elvira Twardowska sendis bildojn pri la juldekorita urbo!



...kaj bildojn el sia balkono, kiam venis la unua neĝo.



Koran dankon de la gotenburga klubo! /Siv

## Vintra saluto el Aŭstrio

– Neĝo estas por vi en Svedio certe nenio sensacia. En Orienta Stirio (Oststeiermark) kaj Vieno neĝis ne multe dum la lastaj jaroj. Tiu ĉi decembro estas escepto. Ekde hieraŭ neĝas senpaŭze.

El la kamentubo venas nebulo (ne fumo). En la



hejtilo estas ligno el 32-jara frakseno. La dura ligno havas altan hejtvaloron.

Vizito de bunta pego.

*Elkoran saluton de  
Walter Klag*

## La kristnaska donaco de 2021 devus esti BRAKUMO, ĉu ne?

Torben Svendsen trovis la bildon.

Prave! La korona pandemio igas nin mediti pri kio valoras en la vivo (sed malfacilas realigi brakumon en korona distanco). /Siv

–En kram borde vara  
Årets Julklapp.  
Eller vad tycker ni?



# Decembra fabelo

de Viola Renvall-Krokkfors

Nun balaas la vento neĝon super la ŝtuparoj  
kaj la ventaj ĉevaloj sternas siajn grandajn  
kolharojn.

Tiru la kurtenojn, elbaru la "ograjn okulojn!"  
Lasu min rakonti al vi pri kobolda viro.

Nun li startas sian piediradon,  
nun, li eklumigas sian lanternon.  
La luma konuso dancas en la vento super la  
neĝdunoj.

La etaj spuroj kirliĝas, ĉiam tute kovritaj.  
Ni ne povas vidi ilin.

Vi kredas ke estas la kato en la kelŝtuparo.  
Vi kredas ke estas la musoj en la budo.  
Vi kredas ke estas la paseroj sur la fenestrobreto.  
Vi povas kredi kion vi volas, sed mi scias.

Kiam patrino estis for, iu formetis la telerlavadon.  
Kiam patro estis for, aŭdiĝis susuro en la gazeta  
bretaro.

Kiu trovis mian floran pantoflon?  
Kiu trinkis el la lakto de la kato?  
Vi povas kredi kion vi volas, sed mi scias.



*Bonan Kristnaskon  
2021*

*deziras Dessan kaj ŝiaj amikoj!*




## Sentenco de la saĝa strigo

**Ĝoja rido plilongigas la vivon!**

- Tiu boato, kiun mi aĉetis, bezonas tri ŝipanojn!
- Do?
- Ja, unu kiu remas, unu kiu senakvigas la boaton kaj unu kiu alvokas helpon.

# Kelkaj memorbildoj pri Britta Rehm

longtempa membro de la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Ŝi forpasis la 14an de novembro, 91-jara. Ni ĉiam memoros, ŝian gajan, petoleman humoron kaj rapidajn replikojn. Ŝi ankaŭ estis membro de KELI. /Siv fotis





# Ora Ĵurnalo, 4-jara, estis celebrita 13 novembro

Esperanto-sabato en Gotenburgo kun prelego de Christer Wigerfelt pri Tidskriftsverkstan.

Ora Ĵurnalo membras en Tidskriftsverkstan kaj kompreneble ni invitis Christer Wigerfelt, dum multaj jaroj ties prezidanto.

Christer rakontis pri la evoluo de Tidskriftsverkstan. Unue gravis helpi al malgrandaj kulturrevuoj pri teknikaĵoj kaj oni fizike laboris en la laborejo.

Poste gravis pri la distribuo de la revuoj. Ne estis facile por malgrandaj revuoj esti videblaj kaj oni strebis fari reklamon por ili.

Kiam la interretrevolucio alvenis, pli kaj pli revuoj cifereciĝis kaj laborejon oni ne plu bezonis. Sufiĉis havi ĉambron por la estrarkunvenoj kaj ejon por la ekspoziciaj objektoj.

Tamen Tidskriftsverkstan ne nur videblas interrete sed ankaŭ papere. Christer kunprenis revuojn, kiujn ni disdonos en venontaj Esperanto-Sabatoj.

Kulturrådet (Kultura koncilio) donos al Tidskriftsverkstan monan kulturan



kontribuon. Nun la revua membraro estas 25 – i. a. Ora Ĵurnalo.

Oni planas ekspoziciojn en la bibliotekoj en du gubernioj – la gubernioj de Kalmar kaj Bohuslando.

Jen Kulturkraft:



En la revuo "Plats för kultur" (Loko por kulturo) de Tidskriftsverkstan artikolo de Ora Ĵurnalo, esperante/svede, prenis lokon.

Ora Ĵurnalo kore dankas al Tidskriftsverkstan pro la publikigo!



Kaj koran dankon al Christer pro la prelego! /Siv



## Ora Ĵurnalo ricevis novan "magazinan kunulon"

dank' al ties redaktoro Dieter Dungert, Germanio. Josef Kriz, Ĉeĥio, kaj Walter Klag atentigis min pri la ekzisto de Magdeburga folio, tre agrabla magazino! Jen kelkaj paĝoj:

# Magdeburga folio

**Neregula interreta informilo  
pri aktualaĵoj  
el la mondo esperantista**



**N-ro 166(66) Novembro-December 2021**

### ENHAVO [de *Magdeburga folio*]:

Subtenu Esperanton ĉe la estonteco-konferenco de Eŭropa Unio .....	2	Fratoj Grimm: Fera Joĉjo .....	15
La 7-a Esperanto-staĝo en METABIEF .....	3	Fratoj Grimm: Vulpo kaj Ĉevalo.....	21
Rekorde intensa kultura monato en Svislando .....	4	Fratoj Grimm: Trivitaj dancĉuoj .....	22
JES 2021/2022 okazos en Wittenberg .....	5	Fratoj Grimm: Ses servistoj .....	25
La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj .....	6	Disiĝi por kuniĝi. Meditoj de nemovadano pri la estonteco de la E-movado .....	30
Klasikaĵo de Stanisław Lem aperis en Esperanto .....	8	Per Esperanto al la havenurbo Klajpedo .....	35
La libroservo de UEA translokiĝos al Slovakio .....	11		

## Rekorde intensa kultura monato en Svislando

Danke al Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj ĝia Esperanto-Domo en Ĉaŭdefono, Svislando gastigis dek unu sukcesajn Esperanto-aranĝojn en unu monato: kurso por formado de stabano, du kursoj pri tradukado, kurso por lingvokomencantoj, Esperantologia Fakultato, Komitatkunveno de KCE, Asembleo de la Esperanta PEN, Asembleo de Feminisma Esperanta Movado, simpozio honore al Eŭgeno de Zilah, lingvotestaj sesioj (de A1 al C1), parlamenta sesio de la Esperanta Civito.

Ĉio okazis reale kun tre malofta telematika partopreno. Aldoniĝis interesaj ekskursoj, distra programo, tre bongustaj manĝoj. De jaro al jaro KCE estas pli kaj pli aktiva oazo por nia kulturo. Kaj venontjare okazos la 11a Kultura Esperanto-Festivalo kun fizika

partopreno!  
Oni ankaŭ konsideru la didaktikan aktivecon paralele en la afrika partnero de KCE: Tanganika Esperanto-Domo.



La kulturaj programoj lasos spuron en la gazetoj Literatura Foiro kaj Heroldo de Esperanto, nun redaktataj. Kvar el kvin membroj de la KCE-Komitato (Bellotti, Bartek, Conde Rey, Martinelli), krome Manuela Blanco kaj Giorgio Silfer intense aktivis dum la tuta monato.

Fonto: HeKo 770 1-B, 21 aŭg 2021

## JES 2021/2022 okazos en Wittenberg



**JES 2021/2022** okazos en Wittenberg, Germanio. JES – la Junulara E-Semajno – estas unu el la plej grandaj Esperanto-aranĝoj de la junularo. Ĉiujare ĝi okazas ĉirkaŭ novjaro dum unu tuta semajno, kutime en Germanio aŭ Pollando. La lasta jaro estis vere defia por ni ĉiuj. Post devigita nuligo de la surloka JES fine de 2020, ni tamen sukcese starigis anstataŭan virtualan eventon kaj tre

ĝojis pri la vasta kaj vigla partoprenado tie. Kaze ke vi maltrafis ĝin, ni alŝutis multajn filmetojn de okazintaj programoj, kiel koncertoj, prelegoj kaj aliaj, sur la jutuba kanalo de PEJ.

Do ni eĉ pli ĝojas povi anonci al vi, ke inter la 28a de decembro 2021 kaj la 4a de januaro 2022 la 13a Junulara Esperanto-Semajno okazos en Wittenberg, Germanio! Kompreneble ankaŭ ni scias, ke la pandemio ankoraŭ ne finiĝis entute, sed

ni optimismas ke fine de tiu ĉi jaro ni povos jam denove renkontiĝi kiel antaŭe, por plej senzorge festi finon ne nur de jaro, sed ankaŭ de tre malfacila tempo.

Nun vi jam povas aliĝi al JES! Se ial vi ne certas ĉu jam aliĝi, ne zorgu kaj ne hezitu: Vi povus malaliĝi ĝis la 30a de septembro kun plena reĝiro de via antaŭpago.

Legu pli en la retejo de JES <http://jes.pej.pl/eo/>. Fonto: [www.tejo.org](http://www.tejo.org).

*Lastminute: La JES estas nuligita pro la pandemio.*

**La ĵurnalo enhavas ĉirkaŭ 40 paĝojn. Jen la kontaktiloj al la redakcio:**

Eldonita en Magdeburg, ĉefurbo de la germana federacia lando Saksio-Anhalto nur

kiel dosiero en pdf-formato, abonebla sendante retpoŝtan peton al la redaktoro Dieter Dungert, Bruno-Taut-Ring 3 e, DE-39130 Magdeburg. Telefono: (0391) 7 21 75 61, e-poŝto: DDungert@t-online.de

## Temo: "gvidlingvo" de federacia Eŭropo

Sekvas artikolo. Ĝin sendis Walter Klag, redaktoro por la Bultinetto, Aŭstrio. La artikolo troviĝas en la 40-paĝa magazino Magdeburga Folio, kies redaktoro estas Dieter Dungert. Pro la kopirajto mi bezonis la permeson de Franz Rader kaj tion Walter Klag peris. Koran dankon!



*Jen la aktuala artikolo (la ilustraĵoj aldonitaj):*

### Kiu oficiala lingvo por federacia Eŭropo?



*"Kion signifas la kabineto Scholz I por EU", de Oliver Grimm, la 26-an de januaro.*

Kiun gvidan oficialan lingvon devus havi federacia eŭropa ŝtato? Ĉu la koalicia interkonsento "Ampel" faras deklaron pri tio?

La angla estus evidenta, ĝi ankaŭ estas ligo en Barato kun 22 regionaj lingvoj kaj Sud-Afriko kun siaj 11, sed devus esti malakceptita emocie (?). Pro tio ke Britio rezignis la EU.

Historie kaj politike estas multo por diri pri la latina, sed ĝia enkonduko postulus gigantan instruprogramon tra la EU-membroŝtatoj, por kiu la nombro de instruistaro eĉ ne estus disponebla. Verŝajne eĉ ne por **la multe pli simpla Esperanto**.

La francoj neniam konsentis pri la supereco de la germana, ĉi-lastaj pli verŝajna al unu el la franca; por meti ambaŭ paralele postulus, ke ĉiuj aliaj eŭropanoj estu trilingvaj, kaj verŝajne superfortus ilin. La demando povus esti decidita per eŭropa referendumo

### Welche Amtssprache für ein föderales Europa?



*"Was das Kabinett Scholz I für die EU bedeutet", von Oliver Grimm, 26. 1.*

Welche führende Amtssprache soll ein föderaler europäischer Bundesstaat haben? Macht der Koalitionsvertrag der "Ampel" hierzu eine Aussage? Englisch wäre naheliegend, ist ja auch Bindeglied in Indien mit 22 regionalen Sprachen und Südafrika mit deren 11, wäre aber gefühlsmäßig abzulehnen (?), da sich Großbritannien von der EU losgesagt hat. Historisch und politisch spräche viel für Latein, dessen Einführung aber ein gigantisches Unterrichtsprogramm quer durch die EU-Mitgliedstaaten erfordern würde, für das es der Anzahl nach gar nicht das erforderliche Lehrpersonal gäbe. Wahrscheinlich nicht einmal für **das weitaus einfachere Esperanto**.

Die Franzosen werden nie einem Primat des Deutschen zustimmen, Letztere einem des Französischen schon eher, beide parallel zu stellen würde nach einer Dreisprachigkeit aller übrigen Europäer verlangen, diese wohl

– en kiu la angla havus la plej bonajn kartojn, sed ankaŭ devus esti decidiĝi ĉu la usona angla aŭ la brita angla?

**Dr. Franz Rader**, 1070 Vieno

Kopirajto © 2021 Die Presse 30/11/2021

La aŭtoro laboris en la aŭstria diplomacia servo kaj estis la prezidanto de la asocio "Muttersprache" (Gepatra Lingvo), Vieno.

überfordern. Entschieden könnte die Frage durch ein europaweit abzuhaltendes Referendum werden – in dem dann doch Englisch die besten Karten hätte, aber auch entschieden werden müsste, ob American English oder British English?

**Dr. Franz Rader**, 1070 Wien

Copyright © 2021 Die Presse 30.11.2021

Der Autor war im diplomatischen Dienst tätig und Vorsitzter des Vereins Muttersprache.

## Kerstin Rohdin kontribuis al la Esperanto-sabato, la 27an de novembro en Gotenburgo. Ŝia filo Pär-Johan Goody-Rohdin akompanis ŝin.

DUM LA ESPERANTO-SABATO Kerstin prelegis pri la dramaro "Eduko Danĝera", kaj pri ties verkisto, Harold Brown.

Jam la antaŭan tagon ni, per helpo de dungito en Redbergsskolan, provis funkciigi la malnovan VHS/DVD-aparaton, kiu akceptis montri bildojn sed ne aŭdigi la sonon per la HDMI-kontaktilo.

Kerstin kaj Pär-Johan solvis la problemon. Sidante en la brilo de lampo, kiel en luma oazo (la cetera ĉambro estis malluma), Kerstin legis la replikojn samtempe ke la pola aktoro Jerzy Fornal silente aktoris en la video. Estis iomete magie. La bildoj havis intensajn kolorojn – sed ili ne estis tute klaraj.

En mia hejmo ni la sekvan tagon pli klare vidis la filmon, kaj lunde ni iris al firmao, kiu transformis la filmon en USB-memorilon. Sume – estas nur komputiloj kiuj tute funkcias en Redbergsskolan.

Kerstin donacis al nia esperantobiblioteko en Stannum videojn kaj kasedojn pri kongresoj de SEF kaj KEF pri eksterlandaj vojaĝoj, muzikkasedoj k.t.p. Instrumaterialoj kiel la Cseh-kursoj kaj "Pasporto al la tuta mondo" troviĝas. Bonas ke ni povas ŝpari pecoj de la

esperanto-kulturo por niaj posteuloj. Sed ni devas ŝanĝi la malnovan teknikon en novan.

**Jen kelkaj bildoj el la filmo: "La vagabondo".** La filmo estas farita en Högsby, Smolando, kie Kerstin iam estis bibliotekistino.



*En la meza bildo ni vidas Kerstin, Jerzy Fornal kaj Zofia Banet-Fornalowa, verkistino kaj edzino de Jerzy.*

*Plej dekstre kelkaj el la aŭskultantoj, sidantaj en korona distanco.*

La dramoj de **Eduko danĝera** bonas kiel diskutmaterialo en esperanto-kunvenoj. Temas pri la diversaj kondiĉoj de la homa vivo. Ili estas sufiĉe mallongaj kaj adaptitaj al unu aŭ pliaj aktoroj. Unu el ili – La Pesto – estas tradukita en 14 lingvojn. »

Jen la retpaĝo de Kerstin Rohdin kaj Harold Brown: [www.u.nu/cFmaZ](http://www.u.nu/cFmaZ)

La tagon, kiam ili revojaĝis al Stokholmo estis dika tavolo de neĝo, sed la buso kaj trajno iris kiel kutime. /Siv.



Krom akompani kaj helpi sian patrinon, **Pär-Johan ankaŭ kuntribuis per artikolo**, kiun li skribis pri sia nova hejmlando en 2004, Aŭstralio. Lia hejmurbo nun estas Perto (Perth).



### Raporto de "Down Under" 2004

Kiam mi translokiĝis de Svedio al Perto en 2004, mi komencis sendi 'Raporton de Malsupre' al familio kaj amikoj reen en Svedio. Mi faris tion dum pli ol tri jaroj. Je la fino de ĉiu 'raporto', mi havis parton pri 'strangaĵoj' en mia nova hejmlando de Aŭstralio. Tiuj partoj de miaj 'raportoj' fariĝis la plej popularaj kaj mi esperas, ke vi ŝatas legi pri la 'strangaĵoj' kiujn mi spertis kiam mi translokiĝis al nova lando unuafoje en mia vivo.

En Svedio ni havas radganton kontraŭ la malvarmo, en Aŭstralio ili havas ilin kontraŭ la varmo, ĉar la stirilo 'ne povas' esti tuŝita se la aŭto staris en la suno, estas simple tro varme.

Ĉi tie ili havas 'Drive through Bottle-butikoj', kio estas vinaj kaj drinkaĵbutikoj, kie vi veturas rekte en kaj tra la vendejo. Vi eĉ ne devas eliri el via aŭto se vi ne volas.

Ludejoj ĉi tie havas 'sunprotektion' kiel en grandaj 'veloj' super ili, por protekti la infanojn kontraŭ la suno.

Kiam estas varme kaj vi promenas en la urbo, vi provas iri kiel eble plej proksime al la pordoj de la butikoj por ricevi malvarmetan aerblon de iliaj klimatiziloj.

Post lavatado, en vere varma tago, vi povas pendigi la littukojn kvaroble kaj ili ankoraŭ sekiĝas.

### Report from Down Under 2004

When I moved from Sweden to Perth in 2004, I began to send a 'Report from Down Under' to family and friends back in Sweden. I did that for more than three years. At the end of each 'report', I had a part about 'oddities' in my new home country of Australia. Those parts of my 'reports' became the most popular ones and I hope that you like to read about the 'oddities' that I experienced when moving to a new country for the first time in my life.

In Sweden we have a wheel glove against the cold, in Australia they have them against the heat, since the steering wheel 'cannot' be touched if the car has been standing in the sun, it's just too hot.

Here they have 'Drive through Bottle shops', which is wine and liquor stores where you drive straight into and through the store. You don't even have to get out of your car if you don't want to.

Playgrounds here have 'sun protection' as in big 'sails' above them, to protect the children from the sun.

When it's hot and you're walking in the city, you try to go as close to the doors of the shops as possible to get a cool puff of air from their air conditioners.

Ĉe restoracioj ĉi tie en Aŭstralio ili ofte havas BYO ("Bring Your Own") bieron aŭ vinon. Ofte restoracioj ne estas plene rajtigitaj.

La kolbasoj ĉi tie en Aŭstralio ne povas esti manĝataj nekuiritaj kiel en Svedio, ĉar estas nur fluanta substanco de viando en la haŭto ĝis vi kuiris ilin.

Longe mi marŝis dekstre, kiam mi renkontis homojn sur la trotuaro, sed eĉ kiam oni renkontas homojn surstrate ĉi tie, ili tenas maldekstre.

En la superbazaro, ĉiuj folioj restas sur la glacimontlaktuko (kiu faras ilin grandegaj). Vi devas komenci per forigo de pluraj tavoloj de la plej eksteraj folioj kaj meti ilin en speciale desegnitajn rubujon, kiu estas havebla en ĉiuj vendejoj, por povi enmeti la laktukon en plasta sako.

Ĉi tie ili havas televidreklamojn, kiujn mi neniam vidis en Svedio. Ili reklamas drogojn kontraŭ kappedikoj. Unu el la sloganoj estas 'Turnu la kapajn pedikojn en mortajn pedikojn!'.

Ĉi tie la normo estas, ke oni havas la frostujon supre kaj la fridujon malsupre kiam oni havas kombinitan fridujon/frostujon, kio estas tiel bedaŭrinda kiam oni devas kliniĝi ĉiufoje kiam oni volas ion el la fridujo, precipe el la legomo-skatolo, kiu estas nur kelkajn centimetrojn super la planko. Ĉu vi scias, kiel oni nomas fridujo/frostujo kie la frostujo estas malsupre, kiel ni havas en Svedio? renversita fridujo!

Estas tiom da specialaj "tagoj" ĉi tie, kiam vi aĉetas malsamajn aĵetojn por kolekti monon por malsamaj celoj. Kelkaj ekzemploj: Tago de Narciso, Tago de Plantu Arbon, Tago de Ruĝa Nazo, Tago de Nacia Bebo kun la amuza slogano "Iru ga-ga", Tago de Ŝlosu Vian Estron, Tago de Promenado al Laboro, Tago de Biciklo al Laboro ktp.

Kiam fuzeo blovas ĉi tie, vi ne ŝanĝas la tutan fuzeon aŭ simple premu ŝaltilon kiel ni faras en Svedio, sed vi ankoraŭ anstataŭigas la metalan draton en la fuzeo mem. La fuzeoj,

After doing your laundry, on a really hot day, you can hang the sheets fourfold and they still dry.

At restaurants here in Australia they often have BYO (Bring Your Own) beer or wine.

It is often that restaurants aren't fully licensed.

The sausages here in Australia can't be eaten uncooked as in Sweden, as there is only a runny substance of meat in the skin until you have cooked them.

For a long time, I walked to the right when I met people on the sidewalk, but even when you meet people on the street here, they keep to the left.

In the supermarket, all the leaves are left on the iceberg lettuce (which makes them huge). You must start by removing several layers of the outermost leaves and put them in a specially designed bin that is available in all stores, to be able to fit the lettuce in a plastic bag.

Here they have TV commercials that I've never seen in Sweden. They are advertising drugs against head-lice. One of the slogans is 'Turn the head lice into dead lice!'.

Here the standard is that you have the freezer at the top and the fridge at the bottom when you have a combined fridge/freezer, which is so tedious when you have to bend down every time you want something from the fridge, especially from the vegetable box, which is just a few centimetres above the floor. Do you know what they call a fridge/freezer where the freezer is at the bottom, like we have in Sweden? Upside-down fridge!

There are so many special 'days' down here, when you buy different trinkets to raise money for different purposes. Some examples: Daffodil Day, Plant a Tree Day, Red Nose Day, National Baby Day with the funny slogan 'Go ga-ga', Lock Up Your Boss Day, Walk to Work Day, Cycle to Work Day etc. etc.

When a fuse blows here, you do not change the whole fuse or just flick a switch as we do in Sweden, but you still replace the metal wire

kiel vi povus kompreni, ne aspektas kiel la svedaj.

Mi faras aerobikon en sportejo kie troviĝas ankaŭ 50-metra subĉiela naĝejo. La stranga afero estas, ke 99% de tiuj, kiujn mi vidis duŝi, faras tion kun siaj naĝtrunkoj, aŭ eĉ en siaj subvestoj, se ili estis al la gimnazio! Vi ne pensas, ke vi estas en okcidenta lando, ĉar mi neniam vidis tion ree en Svedio.

La mistera Somera horo de Aŭstralio (DST):

Dum la aŭstralia vintro (la norda somero) ni havas tri horzonojn; Okcidenta Aŭstralio (WA) en unu, Sudaŭstralio (SA) kaj Norda Teritorio (NT) 1,5 horojn antaŭ ni kaj la resto de la lando; Viktorio (VIC), Novsudkimrio (NSW), Australian Capital Territory (ACT), Tasmanio (TAS) kaj Kvinlando (QLD) du horojn antaŭ ni.

Dum nia somero tamen, ni havas kvin horzonojn en Aŭstralio. WA en unu (ni provis DST dum tri jaroj kun, bedaŭrinde venkita, referendumo poste), NT 1.5 horojn antaŭ ni (ili ne observas DST), SA 2.5 horojn antaŭ ni, QLD du horojn antaŭ ni (ili ankaŭ ne observu DST) kaj VIC, NSW, ACT kaj TAS tri horojn antaŭ ni.

QLD situas oriente de SA kaj norde de NSW, VIC kaj TAS, sed estas malantaŭ ĉiuj tiuj ŝtatoj en tempo (0.5-1 horo).

Dum multaj jaroj TAS komencis ĝian DST kelkajn semajnojn pli frue ol VIC, NSW kaj ACT, kio signifis ke Aŭstralio havis ses horzonojn, ĉar dum tiu tempo TAS estis tri horoj antaŭ WA. Feliĉe TAS de tiam ŝanĝis ĉi tion kaj nun ĉiam konformas kun VIC, NSW kaj ACT. Mi neniam komprenos kial la federacia registaro en Kanbero ne povas fari decidojn kiam temas pri tempo. Mi pensas, ke ĝi estas tute freneza kiel nun, ke ĉiu ŝtato kaj teritorio povas decidi ĉu ili volas DST aŭ ne. En unu etapo, Brisbano kun antaŭurboj volis DST, sed ne la resto de la loĝantaro en QLD, do ili pensis pri enkonduko de DST por partoj de QLD! Kialoj homoj ĉi tie uzas kontraŭ DST estas ke "la kurtenoj pli velkos" kaj "la infanoj ne povos dormi". Kio la ...?!?

in the fuse itself. The fuses, as you might understand, don't look like the Swedish ones.

I do aerobics in a sports centre where there is also a 50-meter outdoor pool. The strange thing is that 99% of those I've seen showering do it with their swimming trunks on, or even in their underwear if they have been to the gym! You do not think that you are in a western country, as I have never seen that back in Sweden.

Australia's mysterious Daylight-saving time (DST):

During the Australian winter (the northern summer) we have three time zones; Western Australia (WA) in one, South Australia (SA) and Northern Territory (NT) 1.5 hours ahead of us and the rest of the country; Victoria (VIC), New South Wales (NSW), Australian Capital Territory (ACT), Tasmania (TAS) and Queensland (QLD) two hours ahead of us.

During our summer however, we have five time zones in Australia. WA in one (we tried DST for three years with a, sadly defeated, referendum afterwards), NT 1.5 hours ahead of us (they do not observe DST), SA 2.5 hours ahead of us, QLD two hours ahead of us (they do not observe DST either) and VIC, NSW, ACT and TAS three hours ahead of us.

QLD is located east of SA and north of NSW, VIC and TAS, but is behind all of those states in time (0.5-1 hour).

For many years TAS began its DST a few weeks earlier than VIC, NSW and ACT, which meant Australia had six time zones, as during that time TAS was three hours ahead of WA.

Luckily TAS has since changed this and is now always in line with VIC, NSW and ACT. I will never understand why the federal government in Canberra can't make decisions when it comes to time. I think it's completely nuts as it is now, that each state and territory can decide if they want DST or not. At one stage, Brisbane with suburbs wanted DST, but not the rest of the population in QLD, so they were thinking about introducing DST for parts of QLD! Reasons people here use against DST is that 'the curtains will fade more' and 'the



Ne estos ankoraŭ alia horo da sunbrilo nur ĉar vi ŝanĝas la horloĝon. Kaj se ni havus DST en WA, ĝi ankoraŭ estus pene nigra je la 21-a.

Ĉu ili pensas, ke ĉiuj infanoj en Eŭropo kaj precipe en Skandinavio vekas la tutan nokton dum la somero?

Kaj fine, por tiuj el vi, kiuj ĉiam scivolis, la akvo en la bankuvo, pelvo kaj lavujo ja elfluas kontraŭhorloĝe, do ĝi estas kontraŭa al tio, al kio ni kutimas en la norda hemisfero. Por tiuj, kiuj scivolas kial, estas ĉar mi estas sude de la ekvatoro. Sed bonvolu, ne demandu min kiel la akvo elfluas, se vi estas ĝuste supre de la ekvatoro ... 😊

*Pär-Johan Goody-Rohdin*

children will not be able to sleep'. What the ...?!? There will not be another hour of sunshine just because you change the clock. And if we were to have DST in WA, it still would be pitch-black at 9pm.

Do they think that all the children in Europe and especially in Scandinavia are up all night long during the summer?

And finally, for the ones of you who has always wondered, the water in the bathtub, basin and sink really does flow out counter-clockwise, so it is contrary to what we are used to in the northern hemisphere. For those who wonder why, it's because I'm south of the equator. But please, don't ask me how the water flows out if you're exactly on top of the equator ... 😊

*Pär-Johan Goody-Rohdin*

## Perth, Västra Australien

*El Vikipedio:* Perto estas la ĉefurbo kaj plej granda grandurbo en la stato de Okcidenta Aŭstralio kaj la kvara plej granda metropolitena areo de Aŭstralio (post Sidnejo, Melburno kaj Brisbano).



*Från Wikipedia:* Perth är huvudort och största stad i delstaten Västra Australien samt Australiens fjärde största storstadsområde (efter Sydney, Melbourne och Brisbane).

## Kerstin kaj Pär-Johan vizitas la Esperanto-bibliotekon en Stannum

Kerstin, kiu iam loĝis en Gotenburgo, aparte interesiĝis pri la libro "Esperanto-rörelsen i Göteborg, 1892–1992". Multaj nomoj estis konataj de ŝi.

Kompreneble Nääs slott – la sinjorlando Nääs – estas deviga vidindaĵo en la komunumo de Lerum. Unu ĉapitro, de la libro "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson" nomita "En Herrgårdssägen" (Legendo pri sinjorlando) skribita de Selma



Lagerlöf, temas pri Nääs. La sinjoro estis malsanega kaj la loka instruistino venis kun siaj gelernantoj por kuraĝigi lin, kantante kelkajn kantojn. La kuraĝo de la instruisto »



subite forlasis ŝin kaj ŝi emis returni, sed Nils Holgersson igis ŝin finfari sian celon, kaj aŭskultinte la kantojn, la sinjoro saniĝis.



*Kerstin kaj Pär-Johan.*

Dum la someraj teatraĵoj "Selma" sidas ĉe la enirejo kaj "Nils Holgersson" venas al ŝi portante vivan anseron. Okazas ke la ansero

kapablas liberigi sin, sed ĝi ĉiam estas kaptita por la dua teatraĵo la saman tagon.

En la malnova ĉevalejo nun estas loko por 30 ĉevaloj. Nääs logas multajn rajdantojn. /Siv

## Julo-vojaĝo al Prago 2013

de Kerstin Rohdin

Karaj geamikoj!

Mi ĵus venis hejmen de tre bela kaj interesa antaŭjulo-vojaĝo, ĉar dum la veraj kristnaskaj tagoj mi sidas hejme sola kun miaj libroj. Tial mi ŝatas jam nun festi. Mi vojaĝis kune kun finna amikino, kun kiu mi jam antaŭe faris interesajn vojaĝojn.

Ni decidis nun vojaĝi al loko tre fama pro kristnaskaj ornamaĵoj, por travivi agrablajn sentojn de kristnasko. Mi trovis oferton pri vojaĝo al Prago, kiu ja famas i.a. pro bonaj julo-dekoracioj. Ĝia famo ne troiĝis. La urbo akceptis nin per malfermitaj brakoj – la urbo, kiu estas ne nur unu, sed kvin diversaj urboj, urbo, kiu montras sin en diversaj vestoj rilate al diversaj periodoj.

Ĝia historio komenciĝis jam antaŭ pli ol 2000 jaroj, kiam unuaj spuroj de "urbo" kreiĝis ĉe



*Bildoj el Interreto (Siv)*

vadejo, kie la rivero Vltava ne estis tro profunda. Tiam keltaj triboj tie setladis. 400–500 jaroj p.K slavaj triboj venis aranĝi siajn setladojn sur la montetoj ĉirkaŭ la vadejo, ĉar tie ili bone povis sin defendi.

Laŭ malnovaj rakontoj kaj legendoj la princino Libus'a, gvidantino por slava matriarka tribo decidis ke la farmisto Premysl estu ŝia edzo. Ŝi petis lin trovi vilaĝon surstrande de rivero Vltava, kaj ke li kreu urbon tie.

Laŭ ŝia antaŭdiro en tiu urbo okazos grandiozaj eventoj. Tiu urbo fariĝos Prago, la ora urbo. La grekaj misiistoj Kyrillos kaj Methodos kristanigis la slavajn tribojn en la 900-a jc. Li baptis i.a. la princinon Ludmila, kiu ankoraŭ estas la sanktulino de Bohemio. Ŝia nepo Wenzel (Vaclav) estis tre religiema, sed estis murdita survoje al meso.

Jam fine de la 10-a jc juda komercisto Ibrahim ibn Jacob admire skribis pri Prago: "Ĝi estas vigla komerca urbo kun multaj ŝtonaj domoj".

En la sama periodo estis konstruita monaĥejo de Sankta Georgo sur la Kastela monto. Nia promenado komenciĝis en la Kastela aŭ Fortikaĵa urbo (unu el la kvin urboj). De tie oni havas vastan superrigardon super la pli malaltajn urbojn. De sube oni vidas la imponan kastelon kaj la preĝejon Sankta Veit, kies altaj turoj fariĝis rekoniloj de la urbo Prago. Prago ankaŭ portas la epiteton, urbo de cent turpintoj, la magia urbo, la ora Prago. Ĉiuj vortoj bone priskribas la urbon – la urbo, kiu en si kapablas mikse konservi Mezepokon, Renesancon, Barokon kaj la pli moderna Jugendperiodon (Art nouveau).

Plurloke la placoj kaj la mallarĝaj, serpentumantaj stratoj estas pentritaj laŭ tiu nova arto. La preĝejoj kaj kupoloj estas dekoraciitaj per oro, la muroj portas pentraĵojn kaj reliefojn de diversaj epokoj. Prago donas malavare de sia unikeco, de sia diverseco, de sia etoso, ke kelkmomente niaj cerboj apenaŭ povas ĉion digesti.

Krom ĉiuj historiaj memoraĵoj, nun dum la jula periodo ĉiuj stratoj kaj placoj lumas de kandelaj festonoj, kiuj envolvas ĉiujn arbojn. Grandaj, larĝaj kristnaskaj abioj plenigas la placojn. Kandeloj okulumas, grandaj kugloj kaj steloj multkolorigas la urbon. En multaj anguloj inter la domoj, surstrate, sur la multnombraj placoj unuopuloj aŭ etaj grupoj ludas klasikan aŭ modernan muzikon. La urbo vibras de arto, muziko, historio.

Tre bonŝance la kruela dua mondmilito ne detruis kaj bombis la urbon. Sed dum alia granda milito "La tridekjara milito" i.a. svedfinnaj soldatoj sufiĉe multe rabis valoraĵojn de la Ora Urbo.

Dum tiu periodo Svedio provis krei al si imponan grandregnon. Certe kiam la homoj de la malriĉa Nordio vidis tiom da valoraĵoj, ili sentis emon riĉigi kaj plibeligi siajn kastelojn, preĝejojn kaj landon.



La Veits-katedralo servas kiel tombo-katedralo por famaj ĉeĥoj dum jarcentoj; reĝoj, artistoj, sciencistoj. Super la suda enirejo de la katedralo la fama mozaiko "La fina juĝo" ŝtelas de ni la spiron. La artaĵo devenas de la jaro 1370 kaj estas kreita de oro kaj ŝtonoj diversspecaj kaj montras Virgulinon Marian, Johanon la Baptiston kaj ses sanktulojn de Bohemio. Ne eblas eĉ parteton priskribi de grandiozeco de la impona kaj grava gotika katedralo, kiu en si entenas elstaran arton de Mezepoko ĝis Art nouveau, la lasta en fenestraj pentraĵoj de Alfons Mucha. Ni flaris odoron de "ĉiuj kvin urboj" el kiuj ekzistas Prago.

Ni vidis la barokpreĝejon Loreto, kun nekredebla riĉeco – eble la plej valora aĵo estas la monstranco de la jaro 1699 dekorita per oro kaj noblaj ŝtonoj. Apude situas Strahov-monaĥejo, en kiu vivis de la jaro 1140 ĝis la jaro 1952 premonstratenmonaĥoj. Ilia ordeno okupiĝas pri studado de filozofio kaj religio.

La biblioteko, kiun oni povas vidi enhavas 130 000 volumojn, 3 000 manuskriptojn kaj 2 000 unuaj eldonoj de libroj, ekz de Nicolaus Copernicus: "De Revolutionibus Orbium Caelestium", en kiu li priskribas, ke la tero ĉirkaŭas la sunon.



Ĉe la Granda Placo de Malnova Urbo ni eĉ kelkfoje admiris la astronomian horloĝon de la jaro 1490 kun la disĉiploj, kiuj ĉirkaŭpromenas la turon. De kafumado kun bongusta kuko en Mozart-kafejo ni vidis la

spektaklon de la astronomia horloĝo. Apude situas la fama domo renesanca "La Domo je la minuto" kun karakterizaj graffito-pentraĵoj. Je ĉiu paŝo oni renkontas famaĵon, vivindaĵon.



Ni sekvis Karlo-straton al la fama Karlo-ponto, 520 metrojn longa. La nuna ponto estis konstruita meze de la 14-a jc kaj staras ĝis ankoraŭ 600 jaroj poste. En multegaj montrofenestroj ni povis ĝui la aspekton de la bohemia kristalo kun diversaj facetoj kaj eĉ kun diversaj koloroj.

La riĉeco kaj fameco de Prago devenas de ĝia perfekta situo inter rivero kaj vojoj inter sudo kaj nordo inter okcidento kaj oriento. Multo renkontiĝas en Prago, multo da homoj, multo da varoj, multo da mono!

Renkontiĝis esperantistoj el nordo (Finnlando, Svedio), el oriento (Kazakio) kaj el la centro (Prago). Fariĝis tre gaja kaj interesa posttagmezo en restoracio de fervojistoj. Etaj modeloj de trajnoj vojaĝis sur la tabloj kaj etaj transport-vagonoj alportis bieron al la manĝantoj. Ni ĉiuj estas geamikoj, ĉar en Esperantio ja funkcias ke "viaj geamikoj estas miaj geamikoj".

